



8-8-1974

CGC Nº

00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103

Telefone (061) 226-1298

70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruas, 471

Telefone (011) 275-1681

04.068 - São Paulo - SP

MAR/ABR/1983

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 76

LA PLEJ BONA ELEKTOPROCEDURO

Kiel konate, 1983 estas elektojaro por Universala Esperanto-Asocio, kies destino administras internacia Komitato.

Laŭ la § 22 de la Statuto de UEA, tiu Komitato konsistas el: 1) komitatanoj A, elektitaj de la aliĝintaj landaj asocioj (en Brazilo, nur BEL kaj KKE rajtas tion fari, ĉar BKE ankoraŭ ne prezentis sian aliĝpeton al UEA); 2) komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj de UEA kaj; 3) komitatanoj C, elektitaj de la komitatanoj A kaj B.

Evidentiĝas do por ĉiu nacio en la mondo la graveco de la A-komitatanoj. Kiujn la aliĝintaj landaj asocioj devas elekti kaj komuniki al la Centra Oficejo en Roterdamo, ĝis la 15a de junio venonta.

Alia punkto de la menciita Statuto (§ 23) fiksas, ke ĉiu landa asocio kun 100 ĝis 1.000 membroj rajtas elekti po unu komitatano A, kazo en kiu troviĝas BEL kaj KKE. Ĝuste pro tio, en la finiĝanta periodo oficis nur prof-ro Sylla Chaves kaj s-ano Carlos A.S. da Cunha, respektive kiel reprezentantoj de la du asocioj en la internacia Komitato.

Por la venonta oficperiodo, Brazila Esperanto-Ligo jam proponis, per sia "BEL-informas" n-ro 3, la reelekton de s-ro Sylla Chaves, aldonante ke "manko de reago al nia propono, ni interpretos kiel apogon al la nomo de ni proponita". Aliflanke, Kultura Kooperativo de Esperantistoj ankoraŭ ne manifestiĝis pri la konfirmo de sia reprezentanto aŭ elekto de

nova, prokrasto kiu estas nekonvena por la vicleco de la movado, ĉefe konsiderante ke la subskribinto perletere jam rezignis sian nunan postenon, kun la celo faciligi al KKE tutan liberan decidon ĉi-rilate.

La plej grave, tamen, en tiu ĉi parto de la nunaj konsideroj, estas konstati, ke per la simpligita elekto-sistemo rekomendita de BEL, kiun verŝajne KKE imitos, la nura akceptado de malfavoraj reagoj ne permesos ke la kandidatoj taksu sian prestiĝon, precipe ĉar la silento de multaj povas reprezenti ne apogon, sed pigrecon. Krom tio — nur por reliefigi la netaŭgecon de la proceduro — en tre rara sed ebla okazo, iu kandidato povus elektiĝi, eĉ kiam 49% de la koncerna asocia membraro estus voĉdonintaj kontraŭ li! Eksterdube, tia aŭ alia stranga situacio certe ĝenos la proprajn kandidatojn, ĉar al ili nenian honoron, gloron aŭ stimulon alportus elektovenko neesprimanta la libervolon de la plimulto.

El tio sekvas la konkludo, ke la silento ne estas la plej bona instrumento por voĉdoni en tiaj ampleksaj kazoj, kion tradicie evidentiĝas la fundamenta regularo de UEA. Estas do konsilinde, ke ĉiu asocia membro de BEL aŭ de KKE skribu al sia organizaĵo manifestante klare ĉu estas "por" aŭ "kontraŭ" la proponita/proponota kandidatoj. Mi faros tion.

Carlos A.S. da Cunha

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Av. Bern. de
Campos 624, Ap. 72, BR 11100 - Santos-SP
Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda
dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068,
São Paulo - SP

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa
Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN
QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília -
DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS
306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua
Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo,
BR 04613, São Paulo - SP

Informa Bulteno

Oficiala organo planita por monata apero.
Dissendo senpaga

RESPONDECAJ DIREKTOROJ: Carlos A.
S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter
Francini
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La
estraro, tamen, ne respondacas pri subskri-
bitaj artikoloj.

DUMVIVAJ KOMENCANTOJ

Komencantoj estas la novaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne scias bone nian lingvon, sed lernas ĝin. La malnovaj esperantistoj tre ŝatas ilin kaj ofte karesas ilin per la simpatiaj nomoj "esperanta suĉinfano", "verda bebo" - Ni amas ĉi tiujn infanojn de nia tutmonda familio kaj ni ĝojas, kiam ilia nombro pligrandiĝas. En ili ni vidas tiun generacion, kiu alportos la tutmondan venkon de Esperanto.

La komencantoj ĝuas specialan privilegion en la Esperanto-mondo. Ili rajtas paroli nian lingvon balbutante, ili rajtas fari erarojn kaj ili rajtas tiel uzi nian lingvon, kiel la infanoj ĝenerale, tio estas, neperfekte.

Kiel la aĝo de infaneco pasas, same ankaŭ la aĝo de "komencanteco" devas finiĝi. Kaj ni aldonu kiel eble plej baldaŭ! La komencanteco devas progresi kaj sin perfektigi.

Tamen, multaj samideanoj miskomprenas nian simpatian al la komencantoj, ili opinias, ke

ni volas havi en Esperantujo nur komencantojn. Tial ili ne klopodas progresi kaj perfektigi. Ili kontentigas je tio, ke ili scias la dek ses regulojn de la gramatiko k povas balbuti kelkajn primitivajn esprimojn.

Efektive, ne malofte okazas, ke ni renkontas samideanon, kiu eĉ post dek aŭ dudek jaroj diras "Bonvolu paroli amlrapide, ĉar mi estas komencanto". Tiuj personoj estas la "eternaj komencantoj", la "dumvivaj komencantoj".

Ne estas granda gloro aparteni al tiu kasto. La publiko rapide konkludas, ke ili ne havas talenton lerni la facilan Esperanton. Tial devas esti intereso de ĉiu komencanto rapide perfektigi.

Sed povas esti pli malbona sekvo. La publiko, kiu pli longe observas tiujn dumvivajn komencantojn, facile faras malfavoran konkludon pri nia ligvo mem. Vidante, ke personoj dum pluraj jaroj ne sukcesis bone ellerni la lingvon oni konkludas, ke Esperanto estas tro malfacila, nelernebla, neparolebla lingvo. Kaj tian lingvon neniu volas enkonduki en la internacian vivon.

Tiamaniere la "dumvivaj komencantoj" povas esti tre danĝeraj k malutilaj al nia movado.

La plej bona propagando por nia lingvo estas: paroli la lingvon. Kaj la plej efika malpropagando estas paroli ĝin malbone antaŭ la ne-esperantista publiko.

Teruran sperton ni havis foje. En tramvagono, kelkaj esperantistoj parolis inter si. Iun momento unu el la ne-esperantistaj pasaĝeroj demandis al sia kunulo: Kiun lingvon parolas tiuj homoj? - Esperanton, respondis la alia. - De kie vi scias? - Ĉar ili balbutas.

Nu, ĉu nia kara lingvo estas balbutlingvo? Jen, kian "servon" povas fari al nia movado la senpriensaj komencantoj. Tial oni memoru ni amas la komencantojn, sed nur unu jaro. En la dua jaro ili devas jam bone paroli nian lingvon. Kaj la sekto de la "dumvivaj komencantoj" devas malaperi. Rapide, rapide!

(El La Praktiko)

PLIGRANDIĜAS BKE-ANARO

Nova ondo de gravaj aliĝoj okazis dum marto kaj aprilo 1983. Jen la nomoj de tiuj karegaj novaj geanoj, kiujn la estraro varme salutas kaj samtempe dankas, pro ilia altvalora apogo al nia Organizaĵo:

D-ro Braz Cosenza; Élio Lopes de Oliveira; Miguel Silva; Jacy Gonçalves de Miranda Sá; Luiz Alberto de Oliveira Coelho; Cesar Rodrigues Gomes; Alberto Luiz Minardi Chueiri; José Pedro Milagres; Lénio Marobin; Gilberto de Mello Brigagão; Deodado de Franca Mello; Paulo Domingos Mieres Cardoso; Mário Mas Gonçalves Filho; Manuel Nery; Delma Terezi-nha de Carvalho; Maria Luiz Werneck; Paulo Vicente Mota; Hermínia A. Magalhães.



TRA LA MONDO

UEA-KOTIZOJ POR LATIN-AMERIKO

★ Per cirkulero de 10-03-83, UEA informis al siaj kotizperantoj, ke ekde aprilo 1983 la kotizoj por sudamerikanoj estos fiksitaj en nederlanda Guldeno ("Florim", en portugala lingvo). La decido sendube forigos la problemon kaŭzitan de la rapide ŝanĝiĝantaj kurzoj en Latin-Ameriko, pro la konstanta inflacio. Por brazilanoj la nunaj kotizoj por aliĝi al UEA kiel AM, MJ, MA, kaj SA estas 0,78, 15,60, 39,00 kaj 23,40 Guldenoj, respektive. Laŭ anoncote en "BEL-informas", n-ro 04, Aprilo 1983, tiujn kotizojn oni povas ankaŭ pagi per internaciaj respondkuponoj (1 intern.rpk = 0,90 Guldeno). Fine ni avertas la interesatojn, ke ĉiuj kotizoj estu sendataj, al BEL aŭ KKE en Rio de Janeiro, ĉar nia Instituto ne rajtas ilin ricevi.

MEDICINA HEROLDO DEKJARAĜA

★ La jam fama kaj internacie konata fak-revuo "Medicina Heroldo" fariĝas 10-jaraĝa. Nuntempe ĝi estas legata en pli ol 30 landoj. Respondecas pri ĝi la delegito de U.M.E.A. en Brazilo, d-ro Helio F. Aderne, kiu preskaŭ sola finance subtenas, ĉef-redaktas, kompostas, enpaĝas kaj dissendas ĝin. Ni aldonu, ke d-ro Aderne estas kunfondinto de Brazila Esperantista Kuracista Rondo kaj ankaŭ de "Kliniko Esperanto", de Belo Horizonte-MG, kie li laboras jam de 12 jaroj helpante senprofitale la malriculojn, laŭ konfidencis al ni d-ro Roberto Resende, el Brazilja.

PASPORTA SERVO DE TEJO

★ Kreita de TEJO, en 1974, laŭ ideo de d-ro Ruben Feldman-Gonzalez, Pasporta Servo celas promociigi interesan turismon, interkulturan kompreniĝon kaj internacian amikecon per kontaktiĝo de homoj, kiuj deziras vojaĝi eksterlanden kun tiuj, kiuj deziras renkonti kaj akcepti gastojn en propra hejmo. Ofte persono deziras vojaĝi kaj akcepti eksterlandanojn, sed ne ĉiuj havas oportunecon gastigi. Tial Pasporta Servo ne postulas nepran reciprokecon. Informojn oni petu al la peranto de la Servo en Brazilo, s-ro Lair Iotti Lara, Rua Ubaldino do Amaral 40/209, CEP 20.231 - Rio de Janeiro-RJ.

LA KRIZO ATINGIS NIN

★ "La situacio kiun travivas nia lando estas, tagon post tago, pli malfacila. La teruraj sekvoj de la ekonomia krizo ŝajnas nemezureblaj, kaj forta ondo de seniluziigo trakuras Meksikion. Kio

okazas? El la plej simpla - ec naŭva - vidpunkto, la fakto estas ke mankas mono. La inflacio atingis dum la pasinta jaro la katastrofan nivelon de 100%, kaj neniu vidas la elirejon al tiu ĉi situacio. Por ni, esperantistoj, kiuj estas forte ligataj al eksterlando, tio tutsimple signifas preskaŭan neniigon de niaj rilatoj per Esperanto. Aĉeti librojn estas por ni seŝoble pli koste, ol pasintjare; vojaĝi al kongreso ŝajnas freneza utopio. La korespondado ankaŭ altiĝis. Kiel ni uzos Esperanton?" Tiu ĉi komentario aperis en frontpaĝa informilo pri Esperanto en Meksikio, titolita "Ni ĉiuj" (n-ro 2, februaro/1983). Ni konstatas tamen ke ĝi aplikigas kun granda precizeco al la nuna brazilia situacio. Bedaŭrinde!

KVIN NOVAJ AKADEMIANOJ

★ La Akademio de Esperanto havas kvin novajn membrojn: Probal Dasgupto (vic-profesoro pri sanskritidaj lingvoj en Puneo, Hinda Unio; Bernar Golden (arkeologo en Veszprém, Hungario); Li Shijun (tradukisto en Pekino, Ĉinio); Bruce Arne Sherwood (vic-direktoro de esplorlaboratorio pri komputila instruado en Urbana, Usono) kaj Humphrey Tonkin (eksprezidanto de UEA kaj profesoro pri angla literaturo en Filadelfio, Usono). Ankaŭ estis reelektitaj 12 jamaj akademianoj, inter kiuj troviĝas nia kara profesoro Geraldo Mattos, loĝanta en Curitiba-PR. La mandato de la akademianoj daŭros pliajn naŭ jarojn (1983/1991).

CIRKULANTA BIBLIOTEKO EN ARGENTINO

★ La Escuela Argentina de Esperanto (Casila de Correo 278 - 2000 Rosario - Argentina), senprofitela organizo por la instruado de Esperanto, petas donacon de libroj por la cirkulanta biblioteko kaj ankaŭ monon, internaciajn respondkuponojn ktp, por la plua funkciado de siaj servoj.

TURISMA E-KALENDARO 1983

★ Ĝi aperis antaŭ kelkaj monatoj, samkiel aliaj flugfolioj kaj broŝuretoj de Monda Turismo, kies landa reprezentanto en Brazilo estas s-ro G. Grattapaglia (Caixa Postal 04-0097, 70.000 - Brasília-DF). Tiu kalendaro listigas por la kurranta jaro pli ol 300 internaciajn esperanto-aranĝojn en la mondo, kio montras la viglecon de la lingvo kaj la informpovon de la grava publikaĵo.

PRI LA 68-a UK DE ESPERANTO EN BUDAPEŬTO

★ Stranga afero. En la Dua Oficial Bulteno de la 68-UK, nek BEL, nek KKE estas listigitaj kiel oficialaj perantoj por la Evento.

★ Dum siaj kunsidoj en Antverpeno la Komitato de UEA aprobis Regularon por Elementa kaj Meza Ekzamenoj. Estas intenco de la Internacia Ekzamena Komisiono okazigi la ekzamenojn kiel regulajn erojn en la programo de la UK.

★ La jaro 1983 estas ne nur la unua jaro en la kvinjara jubilea laborplano de UEA, sed estas ankaŭ deklarita de Unuigita Nacioj kiel Monda Komunika Jaro; tial UEA elektis por la kongreso la temon "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado".



BRAZILAJ NOVAĴOJ

FEDERACIA DISTRIKTO

● Dum la lasta estrarkunsido de BKE en Brazilia estis decidite, ke la jara aliĝotizo de Cr\$ 2.000,00 validos nur ĝis 30-06-83. Post tiu limdato, aliĝo aŭ realiĝo al BKE kostos Cr\$ 3.000,00. Niaj amikoj certe komprenos, ke la decido estis forte influata de la terura inflacio, kiu estas "manĝanta nin ĉiujn per la kruroj"...

● Laborgrupo Antaŭen (Caixa Postal 07-1055, 70000 - Brasília) lanĉos la n-rojn 2 kaj 3 de la serio Brazilaj Kajeroj. Ili estos: "La Brazilaj Aruakoj", verkita de la forpasinta profesoro Francisco Valdomiro Lorenz, kaj "Questões Gramaticais", de la karmemora samideano d-ro Porto Carreiro Neto. Antaŭmendoj kostos respektive Cr\$ 800,00 kaj Cr\$ 600,00. Ni kredas, ke tiuj lanĉoj estas ja parto de la jubilea eldonplano de la Grupo, en kies estraro aktive partoprenas nia vicprezidanto Nelson Pereira de Souza kaj nia asocia membro Kolonelo Adolpho de Miranda Silva.

● Brazilia Esperantista Junulara Organizo - BEJO (Caixa Postal 11.1110, CEP 70.084 - Brasília), pro sia efika tutlanda laboro estis merito-plene laŭdata en artikolo publikigita de la revuo Esperanto (februaro/83), el kiu ni transkribas jenajn frazojn: "Al la konantoj de la brazila movado ŝajnas, ke BEJO jam fariĝis tute samranga partnero de la tri aliaj landaj Esperanto-organizaĵoj. La avantaĝo de BEJO estas la juneco de ĝiaj membroj kaj la verovo, kiu tiu juneco portas kun si". Sendube. Ni samopinias genre, nombre kaj kaze.

MINAS GERAIS

● En Ouro Preto okazos ĉijare la 16a Brazilia Seminario de Esperanto, dum la periodo 21-24 de julio. Grave estas, ke dum tiu evento okazos ankaŭ balotado por la elekto de nova BEJO-estraro por la periodo jul/83-jul/85.

● Aliĝojn al la supra Seminario peras Instituto Esperanto de Educação, Rua Guajajaras 410, 8º andar, sala 809 - 30.000 Belo Horizonte kaj Esperanto Asocio de São Paulo, Rua Faustolo 124 - 05.041 - São Paulo. Kompreneble, vi ankaŭ povas aliĝi ĉe KKE, organizanto de tiu evento, en la adreso Av. 13 de Maio 47, sobreloja 208 - 20031 - Rio).

PERNAMBUCO

● Prof-ro J.M. Mabesoone kaj s-ano Amaro Pinagê Soares laboregas por okazigi en Olinda la venontan ĝeneralan asembleon de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, programitan por novembro 1983.

● Eble la kvara BKE-Kongreso okazos en tiu ŝtato, ĉar la estraro de nia Organizaĵo jam decidis kunvenigi siajn anojn kaj simpatiantojn en la nordorienta parto de nia lando.

PIAUI

● Ĉe Federação Espírita Piauiense (Rua Olavo Bilac 1394 - 6400 Teresina) gvidas Esperanto-kurson nia delegito kaj kompetenta samideano, s-ro Antonio Soares de Pádua.

RIO GRANDE DO SUL

● Sociedade Esperantista de Rio Grande, el la urbo de la sama nomo, estas unu el la plej aktivaj E-organizaĵoj en la ŝtato. Ĝin prezidas jam delonge d-ro Manoel Torres de Abreu, kiu respondecas pri la kolumno "Esperanto - Lingvo Internacia", en la tiea Gazeto do Rio Grande.

● Em Porto Alegre, la arkitekto Ivo Sanguinetti daŭrigas siajn klopodojn cele al disvastigo de la Internacia Lingvo pere de la regiona folkloro. Ankoraŭ estas en nia memoro la brilanta prezentado de la "Esperanto: "Gaúcha Grupo", kiun Sanguinetti venigis en la brazilan ĉefurbon, por ĝojigi la partoprenintojn de la 66a UK. Tiu fama grupo, kiu apartenas ne al ESPA sed al "Gaúcha Esperanto-Asocio", estis la vera grupo kiu prezentiĝis ankaŭ en la Arta Programo de la 2a. Sudbrazila E-Renkontigo, kaj en la fino de 1982 prezentiĝis en TV - E de Porto Alegre kaj estis la centro de folkloro spektaklo organizita tie por pli ol 200 personoj, akompanata de tipa bongusta "ĉarist-riza manĝaĵo".

RIO DE JANEIRO

● "Feliĉaj la Simplaj" estas nova verko eldonita de Brazilia Spiritisma Federacio - FEB, en la lastaj monatoj. Pri ĝi skribis "SEI-Spiritisma Esperanto-Informilo", en sia oka numero: "Kvindek mesaĝoj, verkitaj en klara kaj tre objektiva stilo, kelkaj en formo de kroniko, aliaj kiel malgrandaj rakontoj, konsistigas ĉi tiun libron, kies aŭtoro estas Spirito; kiu donis la nomon Valérium, psikografita de Waldo Vieira, mediumo kaj kuracisto, sindona kunlaboranto por la studado kaj disvastigo de Spiritismo. Ĝi havas 114 paĝojn kaj kostas US\$ 1,70. Mendebla ĉe U.E.A. kaj aliaj libroservoj". Ekzemplero de tiu Informilo estas sendata al ĉiu eksterlanda samideano, kiu ĝin petos al la redakcio: Rua dos Invalidos nº 34, 20231 - Rio de Janeiro.

● En la sideo de KKE, estis ĵus aprobita de s-roj kolonelo Fernando José G. Marinho, d-ro Braz Cosenza kaj Carlos A.S. Cunha la finredaktado de la regularo pri la Nacia Esperanto-Komisiono, kreita en Uberlândia, en julio 1982,

kun la celo orienti la kvinjaran programon por festi la Jubileon de Esperanto kaj zorgi pri ĝeneralaj aferoj de nia movado.

● Kunlabore kun tiu Komisiono, la Brazilia Spiritisma Federacio jam akceptis sugeston reeldoni, en la kadro de la jubilea programo, jenajn elĉerpitaj librojn: 1) *Essência e Futuro da Idéia de Língua Internacional*; 2) *Esperanto Modelo*; 3) *Diverskolora Bukedeto*; 4) *Monumento de Carlo Bourlet*.

● Subtenataj de BEL, akurate aperadas lastatempe la bulteno "BEL-informas", "Esperanto Notícias" kaj ĵus reaperis, por nia granda ĝojo, la mondkonata revuo "Brazilia Esperantisto", kiu ĉesadis cirkuli ekde januaro 1978. Ni varme gratulas la nunan estraron de BEL, kun sincera deziresprimado por ke tiuj utilaj publikigaĵoj daŭro seninterrompe dum multaj jaroj.

● La "Hotelo Presidente", de Porto Alegre (Av. Salgado Filho, 140), sendube kun la celo diskonigi sian nomon kaj adreson, iam komplezis la lokajn esperantistojn per eldono de flugfolioj kun alloga propagando pri la lingvo kaj funkciado de elementa kurso gvidata de Prof-o C. Boris Eston (Rua Jerônimo Coelho, 44/703). Estas agrable konstati, ke ju pli da tempo pasas, des pli la komercistoj notas la taŭgecon de Esperanto por porpagandaj aferoj, ĉefe la hotelentreprenistoj. Tion ĉi pravas la anonco pri servoj de grava hotelĉeno en Brazilia, kiun vi legos aliloke en ĉi-bulteno.

SÃO PAULO

● Loĝas en Caçapava unu el la plej aktiva delegito de nia Organizaĵo: Majoro Gilberto A. Silva Velho, kiu tutsola kaj kun propraj rimedoj grandskale propagandas ĉie nian movadon, inkluzive ekster la limoj de nia patrolando. Multaj informoj kaj novaĵoj aperintaj en tiu ĉi Bulteno venas el leteroj kaj ilustritaj flugfolioj ellaboritaj de tiu sindona samideano, kies eksterordinara laboro por Esperanto estas senkompara en nia lando. Guste pro tio, multajn gratulesprimojn li ja ricevis de, ekzemple: Ŝtataj Leĝofaraj Asembleoj de São Paulo kaj Rio de Janeiro; Urba Konsilantaro de Caçapava; Urbestroj de Alagoinhas (BA), Marília (SP), Itaperai (SP), Sorocaba (SP), ktp. Majoro Silva Velho, dum la lastaj monatoj en Caçapava oficiale reprezentis nian Asocion ĉe jenaj eventoj: I-a Kultura Simpozio de 1983, subigita al la temo "Serĉado de Kultura Identeco de la Paraíba Valo" (19-03-83); Retrospektiva kaj Nuntempa Ekspozicio de Gazetoj el Caçapava (08-04-83); Solena Festo pri Datreveno de la Urbo en la ĉambro de la Urbleĝantaro (14-04-83).

● Deputito Freitas Nobre telegrafis al nia estimata samideano Fanny L. Dupré informante, ke li sendos cirkuleron al siaj kolegoj cele al organizo de interparlamentara grupo por E-aferoj, simila al tiu ekzistanta en la Germana Parlamen-

to, pri kiu raportis Prof-ino Elvira Fontes en artikolo aperinta en "Diário Popular", de São Paulo, en 27-12-82.

● Ankoraŭ estas tempo por via aliĝo al la Regiona Renkontiĝo, kiun Esperanto Asocio de São-Paŭlo okazigos en Jundiaí, dum la tagoj 21/22 de majo, ĉe la "Centro Jundiense de Cultura" (Rua Barão de Jundiaí nº 109). Interesitoj bonvolu informiĝi per telefono de la Asocio, (011) 62-1183.



Tri elektoj por komforto en la Brazilia ĉefurbo

Hotelo das Nações
Hotelo das Américas
Hotelo Alvorada

3 Hoteloj komfortaj, en la centro de Brazilio, proksimaj al la komerca kaj turisma kvartalo. Entute 412 ĉambroj kaj apartamentoj kun klimatizo, fridujo kaj televido, kaj fonmuziko, restoracio, trinkejo, lavejo kaj kunvensalono.

Estu bonvena en Brazilio sub la efika kaj kora prizorgo de niaj Hoteloj.

Rezerv-centro:

Telefonoj: (061) 223-4490

225-8050

Telekso: (061) 1484

Adreso: HS 4 - Bloco D - P.P. - Brasília - DF.

ATENÇÃO, LEITOR

O movimento esperantista brasileiro precisa do seu apoio. Filie-se ao Clube de sua cidade e, se possível, a qualquer das seguintes organizações nacionais: Liga Brasileira de Esperanto (Praça da República, 54, 2º andar, 20.211, Rio de Janeiro-RJ), Cooperativa Cultural dos Esperantistas (Caixa Postal 1.887, 20.000 - Rio de Janeiro-RJ), Instituto Esperanto de Educação, Rua Guajajaras, 410, 30.000 - Belo Horizonte-MG), BEJO - Brasileira Esperantista Junulara Organizo, Caixa Postal 11-1110, 70-084, Brasília-DF) ou Conselho Brasileiro de Esperanto, Edifício Jockey Club, sala 103, BR 70.300 - Brasília-DF).

SEKVENDAJ EKZEMPLOJ

Dum multaj gesamideanoj scias nur kritiki sed nenion utilan kapablas fari, feliĉe estas kelkaj kiuj anstataŭ kritiki preferas nur labori por la bono de Esperanto. En la lasta grupo troviĝas du sindonaj samideaninoj el Rio de Janeiro, kies iniciatojn oni volas elstarigi kiel sekvendajn ekzemplojn.

I

En la komenco de aprilo, s-ino May Bijleveld vizitis en nomo de Brazilo Esperanto-Ligo kelkajn fojojn la "Sociedade de Ensino Superior, Estácio de Sá", en la strato Bispo - Rio de Janeiro, por tie-paroli kun profesoroj de diversaj fakultatoj. Ŝiaj unuaj demandoj ĉiam estis: "Ĉu vi estas tre okupata? Ĉu vi havas 5 minutojn por paroli kun mi?" - "Jes, pri kio?" ĉiu respondis. "Mi estas faranta enketon pri la opinio de universitataj profesoroj pri Esperanto. Kio estas via opinio? Bonvolu skribi ĝin en tiu ĉi kajero".

Multaj estis teorie favoraj, sed dubis pri la praktika ebleco, ĉefe ĉar ili konas neniun esperantiston. Generale la respondo estis: "Mi ne havas opinion, ĉar mi ne scias multon pri ĝi". Nur unu profesoro diris: "Mi jam scias la francan, kaj tio sufiĉas. Esperanto estas nura utopio".

S-ino May respondis, ke inter la esperantistoj estas personoj, kiuj parolas 6, 8 aŭ 12 lingvojn kaj tamen uzas Esperanton.

La kvin petitaj minutoj ĝenerale kreskis ĝis 15 aŭ 40 minutoj, ĉar ŝi montris la Jarlibron, revuojn, librojn, klarigis la celon kaj la hodiaŭan uzon, respondis ĉiajn demandojn kaj disdonis informajn flugfoliojn kaj prospektojn de BEL. Je la fino ŝi petis: "Bonvolu aldoni ankaŭ vian nomon, profesion kaj adreson al tio, kion vi skribis en mia kajero. Tiel estonte ni povos sendi al vi la lastajn sciigojn pri Esperanto".

Post kelke da tiaj vizitoj ŝi atingis la universitatan direkcion, kie oni jam estis aŭdinta pri ŝia agado kaj iĝis tre sciivola pri la progreso de Esperanto. Rezultato: la direkcio invitis ŝin por fari paroladon pri Esperanto por la beletra fakultato (prahistorio, evoluo kaj perspektivoj de Esperanto) kaj promesis organizi kurson se la parolado kaŭzos sufiĉan intereson. Jam nun pli ol 70 deklaris ke ili volas ĉeesti la paroladon.

Tion saman oni povas fari ankaŭ en aliaj universitatoj de Rio kaj aliaj urboj. Kiu pretas sekvi la ekzemplon? (Kunlaboraĵo de BEL, por BKE-Bulteno).

II

Samideanino Elma do Nascimento, sen nenia subteno, sed per propra iniciato kaj persista agado, finfine sukcesis enkonduki la Internacian Lingvon en la Ordenon "Rosacruz", en Rio de Janeiro. Kaj ĝojigas nin scii, ke ŝia fortostreĉo bele, fruktodonis, tiel ke du idealistoj tuj poste inaŭguris novajn esperantajn kursojn en aliaj loĝioj de la Ordeno: samideanoj Wagner, en Jacarepaguá kaj Sebastião, en Niterói.

La pionira kurso gvidata de Elma do Nascimento funkcias regule ĉiun lundon, en la "Loja Meier - AMORC" (Rua Fábio da Luz 50, Meier, CEP 20720 - telefono 594-9148 - Rio), de la 19h00 ĝis la 20h00, por komencantoj kaj de la 20h00 ĝis la 21h30, por tiuj, kiuj jam havas bazajn honojn pri la lingvo.

Casc

STRANGA VOĈO

Manoel Borges dos Santos

*Kiam la vivo — plena de laboro,
atingas supron de l'plej alta monto,
de kie, per rigard'al horizonto,
mi vidas transe revojn el la koro ...*

*Kiam en ni kreskadas la memoro
kaj ŝprucas akvo el la klara fonto,
fariĝas pasintaĵo — la estonto,
iama rev'-real' en la nunhoro ...*

*Kiu el ni ne sentas ke l'kuraĝo
estas necesa por la fina staĝo?
Ho! kiun ne timigas la Futuro?*

*"Nur min!" respondas basa, stranga voĉo,
dum la tombist' per levo de l'pioĉo,
ekfosas novan tombon inter muro.*



LETEROJ RICEVITAJ

☆ "En via letero, de la 23-a de novembro de la pasinta jaro, vi menciis ke via organizaĵo, la Brazilia Konsilantaro de Esperanto ofertas apartan premion de Cr\$ 20.000 al la "gajninto" de la tutmonda konkurso pri Jubilea Afiso, kondiĉe ke la premiito estu brazilia civitano. Per mia letero, la estraro de UEA konfirmas la ricevon de via letero kaj deziras aparte danki vin pro via subtena helpo" (Adré Staes, administranto de la Jubilea Jaro - Antwerpen, Belgio).

☆ "Recebemos a amável missiva de 04.12.82, em que V.Sa. nos comunica resolução do plenário do III CONGRESSO ANUAL DO CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO, realizado nesta Capital de 03 a 05.12.82, concernente à Federação Espírita Brasileira. Temos o prazer de informar que, em princípio, todos os itens da resolução foram por nós aceitos, cabendo-nos, porém, os seguintes esclarecimentos: a) a Federação aguardará que as organizações dirigentes do movimento esperantista elaborem, com vistas ao Jubileu de Esperanto, o seu próprio quinquenal (1983 a 1987), a que ela se associará, no todo ou em parte, após exame da Diretoria; b) a reedição dos livros citados está aceita e, por si só, já configura um programa quinquenal, se se considerar o tempo necessário para as reimpressões. Indicamos o 2º Secretário desta Casa, Sr. Affonso Borges Gallego Soares, para representar a Federação nos trabalhos da comissão nacional do Jubileu" (a) Francisco Thiesen, Presidente da

Federação Espírita Brasileira.

☆ "Vian afablan leteron de 140482 ni ricevis kaj tre dankas! Ni ĉiam rajtas esperi, ke streboj kaj klopodoj por unuiĝo nepre donos kiel rezulton bezonan kunigon de fortoj por atingo de komunaj celoj: bela koncerna iniciato ja estas "Nacia Komitato de Esperanto", pri kiu ni esprimas la sinceran kaj varman deziron, ke ĝi konduku la aferon esperantan en nia lando laŭ la vojo montrita de Zamenhof" (Brazilia Spiritisma Federacio - Affonso Borges Gallego Soares - 2a Sekretario).

☆ "Nuntempe ni troviĝas en periodo de reorganizado. Post longa stagnado, dum kiu la Meksikia Esperanto-Federacio preskaŭ ne funkciis, ni devas reorganizi ĉion, ekkomencante praktike de nulo. Nia nuna stato ne estas tia, ke ni povas kontribui al organizo de kupola Federacio, sed male, ni eĉ bezonas helpojn kaj konsilojn por organizi nian enlandan movadon. Mi deziras, tamen, profiti tiun ĉi okazon por malfermi rilatojn al niaj samkontinentaj samideanoj. Mi forte

ŝatus vidi ekflori granda, fortika movado en niaj landoj, kiuj tre multe tion necesas" (Jorge-Luis Gutiérrez, el Informa Fakto de Meksikia Esperanto-Federacio).

☆ "Em Ilhéus, eu consegui a duras penas comprar o busto de Zamenhof e pretensão pô-lo na praça, no ano do centenário de Ilhéus. Pasmem os amigos! Não me permitiram sob a alegação de que Zamenhof é ilustre desconhecido. Por causa disto eu tive até discussão com um vereador . . . O que eu quero é que todos os esperantistas possíveis, todas as instituições do Brasil, mandem carta à Câmara de Vereadores de Ilhéus . . . discretamente falando do Esperanto, suas finalidades e, se possível, quantas cidades do Brasil e do Mundo já homenageiam Zamenhof com seu busto em praça pública" (Eléus Leonardo de Sá, Prezidanto de Ilhéus Esperanto Grupo (BA) kaj Peranto de Monato).

☆ "Tenho a elogiar o belo trabalho desenvolvido pelo Conselho durante o ano de 1982, principalmente pela realização do 3º Congresso do CBE, com grande sucesso. Parabêniz também a equipe da Tesouraria pelo espetacular superavit de Cr\$ 2.244.491,87, conseguido em 1982". (Sorokaba Esperanto Klubo - Eluizio Bueno Rodrigues - Presidente).

☆ "Leginte en BI n-ro 75, la bilancon pri la pasinta jaro, mi povis konstati ke la Estraro de BKE priokupiĝas kun la afero mono. Tio estas laŭdinda ĉar oni ne povas vivi sen tia rimedo. Nur forte mone kaj morale, la esperantaj institucioj povas plenumi siajn celojn. Tiel pensante mi sendas al Vi miajn personajn informojn kaj ĉekon por anĝi al BKE" (José Pedro Milagres, São Gonçalo-RJ).

☆ "Mi tute komprenas viajn malfacilaĵojn, pro la ekzisto de tiuj viglaj E-organizaĵoj kiel la tri Landaj E-organizaĵoj ekzistantaj en via Lando, precipe rilate la reprezentadon antaŭ la Universala Esperanto-Asocio". (Maria Rafaela Uruena Alvarez, Prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio).

VIVU ESPERANTO!

Cruz e Souza

La mondon regas peza la malbono.

Ankoraŭ foje fido malaperas.

Kaj tre malinda ja fariĝis homo

Por senti Dion; tial malesperas.

Mortas Espero, Fido kaj la Paco,

En homa koro naskante doloron.

Homoj ne amas sin antaŭ minaco,

Kaj sendas al la Kristo sian ploron.

Sed jen la Kristo diras al la Patro:

— La multaj lingvoj estas ja bariloj;

Tial suferas la amataj filoj.

Forigos mi doloron de l' homfrato.


Ce la homaro estos sola kanto:

Naskiĝis Zamenhof . . . Jen Esperanto! . . .

Esperantigis Nelson Pereira de Souza.

HORIZONTALA

1 - Fabela estaĵo kun supernatura povo; 5 - Kaj Tiel Plu; 8 - Prepozicio; 9 - lo kiu baras aŭ malhelpas (Sen finaĵo); 11 - Internacia Instituto; 12 - Aro da bambuoj (Sen finaĵo); 14 - Kaj Aliaj; 15 - lu kiu estas ĉe supera kaj unuarango; 16 - Mangebla fingroforma frukto de tropika arbo (Sen finaĵo); 18 - Nedifina pronomo, montranta iun objekton, aferon, ideon; 19 - C²H⁶O. Fluaĵo ricevita el destilado de vino, greno kaj diversaj fermentintaĵoj (Sen finaĵo); 22 - Loka Komitato; 23 - "Hol mia...". Diris Zamenhof; 24 - Difina senfleksia artikolo, uzata precipe antaŭ substantivo; 25 - Orienta Organizaĵo pri la studado de Osmozo; 26 - Semgrajnoj de kafarbo (Sen finaĵo).



VERTIKALE

1 - Kaphaŭta malsano, kaŭzata de parazito, kaj karakterizata per krusto (Sen finaĵo); 2 - Prepozicio; 4 - "Ludoviko Lazaro..."; 6 - Ceremonia kapvesto de la Papo, ornamita per tri kronoj; 7 - Bongusta Frukto; 9 - Interjekcio esprimanta surprizon; 10 - "Restoracio Blua Stelo"; 12 - Ŝtata instituto, aŭ privata firma por financaj operacioj (Sen finaĵo); 13 - Profite uzebla (Sen finaĵo); 14 - Kalkioksid, ĉefelemento de marmoro, gipso, kaj uzata kiel mortero; 16 - Kunveno en kiu oni dancas; 17 - "Audul Observul Kalkulul!"; 20 - Ora Relikvujo; 21 - Fandita varmego materio, kiu elfluas el vulkanoj... (Sen finaĵo); 24 - Difina senfleksia artikolo, uzata precipe antaŭ substantivo.

UEA BEZONAS NIN

Sub tiu titolo BEJO prezentas en la n-ro 10 (jan/83) de "Momentoni" tre interesan artikolon.

Vere, laborinte en la CO de UEA pli ol 3 monatojn, s-animo Neima povis fari gravajn konstatojn, kiuj devas pensigi (kaj laborigii!) nin ĉiujn. Grave estas legi tiun artikolon por scii, kion ŝi informas pri la strukturo de nia tutmonda asocio.

Notindas ankaŭ, ke en la esperanta gazetaro ofte aperas skribaĵoj tiurilate, el kiuj ni transskribas parton de tiu verkita de S-ro I. Durwael (Belgio) kaj publikigita de "Heroldo de Esperanto", n-ro 1-1708: "Sed mia impresio estas, ke UEA de jaro al jaro pli sekvas la ten-

dencon al pli strikta strukturigo. En Stokholmo mi ĉeestis dum 3 tagoj la komitatkunsidojn kiel anstataŭanto: mi preskaŭ malsaniĝis pro la fakto, ke 50 homoj diskutas pri punktoj kaj komoj de difinita regularo, kiu en la praktiko neniam aplikiga pro manko de agado sur tiu kampo. Ŝajnas al mi, ke la oficistoj en la CO dronas sub la administraj zorgoj kaj ne plu povas okupiĝi pri individuoj".

Tial ni povas mem konkludi: ja ni ĉiuj kulpas, ke UEA ne povas funkcii kiel ĉiuj deziirus, ĉar ni ne devas atendi, ke niaj rilatoj estigu nur direkte de ĝi al ni, sed kiel inteligenta proponas la Prezidentino de BEJO: "Ni devas kontribui, kritiki, proponi kaj fariĝi produktiva movado..."

Nelson Pereira de Souza